

Alfred Knapp,  
Printemp-vekiĝo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Leviĝis Sun',  
tagiĝas nun,  
la nokto iĝis for.  
Sub ĉielblu'  
jubilas plu  
de l' birdoj vigla ĥor'.

Floreto jam  
en la ornam'  
de sia petalar'  
malfermis sin,  
ĝojigas nin  
per sia rosa klar'.

Ja iĝas for  
de l' kor' dolor',  
se ĝin rigardas vi.  
De l' Tero rond',<sup>2</sup>  
la tuta mond',  
belega estas ĝi!

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingserwachen" de ALFRED KNAPP (\*1933-03-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-273-553 (2005-01-24 21:54:05)*

---

<sup>2</sup>aŭ: La Tera rond',